

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2014 Vendredon la 29an de aŭgusto 62a jaro

Kalendaro

Atentu: ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 2an de septembro (semajno 36) – *TIR*Sdag

Raportoj de Kjell Peder Hoff kaj Otto Prytz pri la 99a Universala Kongreso en Bonaero.

Kjell Peder Hoff og Otto Prytz forteller fra den 99. verdenskongressen i Buenos Aires.

MARDON la 16an de septembro (sem. 38) – *TIR*Sdag

Vidar Skretting ĵus revenis post studrestado en Jordanio kaj somera laboro tie ĉe la komisiono de UN pri rifuĝintoj. Li havas multon por rakonti.

Vidar Skretting er nettopp tilbake fra et studioophold i Jordan og sommerarbeid der ved FNs høykommissær for flyktninger. Han har mye å fortelle.

Mardon la 7an de oktobro (sem. 41) – *tirs*dag

Kiel prezenti Esperanton al la publiko? Kjell Peder Hoff havas kaj ideojn kaj proprajn spertojn. Diskuto.

Hvordan fortelle om esperanto til andre? Kjell Peder Hoff har både ideer og egne erfaringer. Diskusjon.

Lundon la 20an de oktobro (sem. 43) – *mand*ag

Otto Prytz kaj Pilar Menéndez rakontos pri sia dumonata vojaĝo en Argentino, Ĉilio kaj Urugvajo, kun ilustraĵoj vidaj kaj aŭdaj

Otto Prytz og Pilar Menéndez forteller fra sin tomåneders reise i Argentina, Chile og Uruguay, med illustrasjoner på lyd og bilde.

Mardon la 4an de novembro (sem. 45) – *tirs*dag

Eble studgrupo pri interlingvistiko? Vd Revuon *Esperanto*.

Kanskje studiegruppe om interlingvistik? Se Esperanto de UEA.

Lundon la 17an de novembro (sem. 47) – *mand*ag

Otto Prytz klarigos pri iu lingva problemo. Detaloj poste.

Otto Prytz forklarer om et språklig problem. Detaljer senere.

OKAZIS

Lundon la 17an de marto

Kial homoj lernu Esperanton, nun en Norvegio en 2014?

De la praktika valoro de Esperanto ni kune trovis plurajn bonajn ekzemplojn – turisma vizito aŭ ekloĝado en fremda lando, Biblia kurso kaj propedeŭtika efiko. Ideologie Esperanto daŭre superas etnajn lingvojn pro sia relativa neŭtraleco. Tamen ni povis el propra sperto konfirmi ke la lingvon homoj eklernas ne pro la ideologio sed pro ĝenerala lingvemo aŭ pro hazarda konatiĝo. Sed konscio pri la ideologio aktivigas kaj restigas homojn en la movado. Ni konkludis ke la mondo ne tiom ŝanĝiĝis ke la klasikaj argumentoj por uzado de Esperanto perdis sian validon.

Mardon la 1an de aprilo

Ni esploris per la komputiloj de Cato la 8 GB-**lundiskegon** (DVD) *Esperanto elektronike*, faritan de la teamo E[ĉe]I en 2006. Ĝi enhavas por scivolemuloj plurajn informfoliojn en multaj lingvoj. Por lernantoj troveblas sur ĝi kursoj de *lernu* kaj la brazila *Curso de Esperanto*, kaj ankaŭ *Plena Manlibro de E-a Gramatiko* (PMEG) kaj la *Reta Vortaro* (ReVo). Kaj por jamaj uzantoj estas sciencaj artikoloj kaj kongresaj prelegoj. Ni aŭskultis klasikajn paroladojn de Edmond Privat kaj Ivo Lapenna.

Lundon la 5an de majo

Kromkunveno kun **Stefan MacGill, la vicprezidanto de UEA**. Li klarigis pri kelkaj reformoj de la strukturo de UEA: unue la estraraj subteamoj – pri mastrumado, movado kaj rilatoj al la mondo – kaj due la nove starigita konsilio subtena al la estraro. La unua seminario pri Aktivula Maturigo ĵus realiĝis en Hungario, kun forta partopreno de hungaraj junuloj, kaj io simila okazis en Svedio en formo de ateliero antaŭ la landa kongreso.

Post paŭzo li montris al ni (per la komputilo de Cato) kelkajn lecionojn de sia ankoraŭ verkata kurso *Esperanta etape*.

Mardon la 6an de majo

La 200-jara **jubileo de la norvega konstitucio**. Ni interparolis pri la dramecaj kaj mirindaj eventoj de la jaro 1814.

Lundon la 19an de majo

Ni diskutis la **aserton de Lanti**, ke Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo, ĉar ĝi devigas nin senĉese obei logikon, dum en aliaj lingvoj ni sekvas kutimojn ne-logikajn. Ni konstatis ke Esperanto baziĝas sur reguloj, pli aŭ malpli facilaj, same kiel aliaj lingvoj. La diferenco estas ke en Esperanto ili estas grandparte senesceptaj, kio nepre faciligas lernadon. Kaj nun, preskaŭ 90 jarojn post la eldiro de

Lanti, estas tiom da lertaj uzantoj de Esperanto, ke eblas rekte absorbi ĝin ĉe ili, same kiel aliajn lingvojn ĉe la gepatroj, sen konscia atento al la gramatiko.

Mardon la 3an de junio

Ni aranĝis **studkunvenon pri la verboj** en Esperanto: Ni trarigardis listojn de la plej oftaj transitivaj kaj netransitivaj, uzante ilin en ekzemplaj frazoj, ankaŭ kun aldonaj *-iĝi* aŭ *-igi*, do nun netransitivaj aŭ transitivaj respektive.

Lundon la 16an de junio

Kiel konvinki lernantojn aŭ scivol-emulojn ke Esperanto estas pli

rapide lernebla kaj pli facile uzebla ol etnaj lingvoj? Oni menciuj la principon unu litero / unu sono kaj la regulon pri la akcento. Ke per afiksoj ekz-e *pra-arb-aro* aŭ *skrib-ilo*, *-ebla*, *-inda*, *ek-*, *mis-*, *fi-skribi*, oni povas esprimi apartajn norvegajn vortojn kaj ke ekz-e *-ano* estas universale uzebla – *eŭropano*, *aziano*, *familiano*, *kursano*, ktp male al en la norvega. Do ke reguloj en Esperanto estas universale validaj. Jen baza diferenco inter Esperanto kaj etnaj lingvoj. Cetere la lingvon oni pli facile lernas se oni amuziĝas – ekz-e per proverboj aŭ kantoj.

Medikamentoj por malriĉaj afrikanoj

Mramba Simba estas vilaĝar-estro de Ketare, grupo de kvar vilaĝoj en Bunda, apud la lago Victoria en norda Tanzanio. Li estas kunfondinto de Tanzania E-Asocio, kaj ties unua prezidinto (komence de la 90aj jaroj).

Nia membro Snorre Benum vizitis lin en 2008, instruis Esperanton tie en loka lernejo dum du monatoj, kaj poste subtenis konstruon de nova mezlernejo *Esperanto secondary school*, kie ĉiuj 200 lernantoj nun lernas Esperanton plurajn fojojn semajne. (Li rakontis pri tio en kluba kunveno 2.2.2009.) La lernantoj volas korespondi pri ĉiuj temoj. <smbmramba[a]yahoo.com>

Bunda estas la plej malriĉa regiono en Tanzanio. En la vilaĝaro Ketare loĝas preskaŭ 9 000 homoj, el kiuj ĉ 2520 (420 familioj)) estas malriĉaj kaj bezonas monhelpon okaze

de malsano. Oftaj malsanoj estas malario, diareo, pulminflamo, tuberkulozo kaj aidsos.

La ŝtata sanservo estas baze senpaga, sed en la praktiko la pacientoj devas pagi por medikamentoj. Do la registaro starigis san-asekuron. Ĝi kostas 20 eŭrojn jare por seskapa familio, kaj la ŝtato pagas duonon. Sed tiuj malriĉuloj ne povas pagi la aliajn 10 eŭrojn.

Do nome de la loka evolu-forumo, *Mazingira*, Mramba Simba petas kontribuojn por san-asekuro por malriĉaj vilaĝanoj, po 10 € por familio jare. Per viaj 10 eŭroj, li



skribas, vi povas helpi unu familion de 6 personoj; aŭ per 100 eŭroj vi helpos 10 familiojn de 60 personoj, kiuj ricevos kuracadon dum unu jaro.

Tio ne estas rekte Esperanta projekto, do ni ne povas uzi kluban monon. Temas pri simpla esprimo de solidareco, el nia superabundo al ilia baza bezono per bona iniciato de afrika esperantisto. Vian kontribuon vi povas sendi al nia kluba konto 0532 36 19699 aŭ rekte al la

UEA-konto de Mramba Simba, smba-n, ambaŭloke nepre kun la indiko "K-de malriĉa familio".

Cetere, inter la eŭropaj kontaktuloj de *Mazingira* estas konataj nomoj: Heidi Goes, la juna belgino kiu sola revivigis la indonezian movadon (vd. *Norvega Esperantisto* 2 kaj 3/2012) kaj Manfred Westermayer, la sekretario de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE).

DD

Librofoiro

Nia membro Cato Haugen luas parton de nia kunven-ĉambro por stokado kaj vendado de (plejparte) norvegaj libroj. Vendredon 12. septembro 16 – 20 kaj sabaton 13. septembro 12 – 17 li aranĝos librovendofiron kune kun *Oslo Bokfestival*. Temo "Espero por pluraj" (*Håp for flere*). Vidu programon ĉe: www.oslobokfestival.no/program.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo al Sinsen.
* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper